Kondiĉoj

* Nekompletaj aliĝoj ne estos traktataj.
* La baza kotizo inkluzivas loĝadon kaj manĝojn ekde vespermanĝo la 5an ĝis matenmanĝo la 12an de aŭgusto kaj ĉiujn programerojn krom ekskursoj.
* Aliĝoj ekvalidas je la sendodato de la antaŭpago. Ĝis la 1a de februaro 2000 la antaŭpago estas 30 EUR por A-landanoj kaj 15 EUR por B-landanoj, post tiu dato la antaŭpago estas 50 EUR por A-landanoj kaj 30 EUR por B-landanoj.
* Individuaj membroj de TEJO aŭ de UEA ricevas rabaton. A-landanoj 12,25 EUR kaj B-landanoj 9,50 EUR
* La Loka Kongresa Komitato (LKK) akceptas nur individuajn aliĝilojn. Asocioj kiuj agas kiel perantoj de IJK 2000, bonvolu kolekti individue kompletajn aliĝilojn kaj kunsendi kalkulon por la kolektiva sumo.
* Malaliĝi eblas ĝis la 31a de junio 2000. Ĝis tiu dato vi povas ricevi vian kotizon, minus la antaŭpago kaj la administraj kostoj. Transdono de antaŭpago eblas nur ĝis la 1a de julio 2000. Ni alĝustigas la kotizon sed ĝi ne povas malplialtiĝi.
* Kongreskotizo ne inkludas ekskurson, vojaĝkostojn ekster la kongresejo kaj/aŭ asekurojn iajn ajn. La LKK de IJK 2000 ne respondecas nek kompensas pro iaj ajn leĝaj pretendoj kontraŭ la LKK de IJK 2000 aŭ ties organizantoj.
* Kongreskotizo por parttempaj partoprenoj estas la plej alta kotizo de via aĝo/landokategorio dividita per 6 oble la nombro de partoprentagoj.

Pagmanieroj:

Sendu la monon al unu el la jenaj kontoj (kun rimarko 'IJK2000')

* 'hkje-p' ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
* 'Honkonga Junulara Esperanto-Asocio' 004-774733-001 ĉe HongkongBank de HKSBC (The Hongkong and Shanghai Banking Corporation).

Mi estas membro de TEJO: jes / ne* Se jes, membrokodo: . . . . - .

Se vi ne estas membro de TEJO, ni konsilas samtempe membriĝi.

Mi volas manĝi vegetare: jes / ne*

Mi antaŭpagas: . . . . . EUR, je la . . / . . / . . . . *(tt/mm/jjjj)*

Al: UEA-konto / HKSBC bankkonto*

Mi aldonas kopion de la ĝirilo al tiu ĉi aliĝilo.

Mi atestas ke la supraj informoj estas aktualaj kaj korektaj. Mi tutkomprenas la kondiĉojn indikitajn en tiu ĉi aliĝilo kaj akceptas ilin.
Mi partoprenas parttempe de . . . . . gxis . . . . . .

Dato: . . . . . Subskribo: . . . . . .

* trastreku la ne-validan

Sendu la aliĝilon al: LKK de IJK 2000:
Ĉina Junulara Esperanto-Asocio, P.O. Kesto 77, Beijing, CN-100037, Ĉinio

Novembro 1999, TEJO.

HKJEA • TEJO • ĈJEA

第五十六屆國際青年大會

La 56ª Internacia Junulara Kongreso

• HONKONGO •

La transiro al tutmondiĝo

Tutglobismo en la 21a jarcento

5-12 aŭgusto 2000

Honkongo

Siatempe trankvila fiŝvilaĝo, Honkongo travivis 100-jaran kolonismon kaj plenkreskiĝis kiel unu el la plej dinamikaj metropoloj de la mondo. La antaŭnelongan ŝangon de suvereno kaptis la atenton de la tuta mondo. Hodiaŭ Honkongo havas la plej liberan komercadon de la mondo kaj oni konsideras ties 6 milionan loĝantaron unu el la plej laboremaj popoloj. Honkongo estas mirakla rakonto de kunvivado kaj prospero.



Honkongo nun estas la plej grava financa centro de Azio kaj ĝi forte ligiĝas kun aliaj aziaj urbegoj. Vizitantoj de pli ol 180 nacioj povas viziti Honkongon sen vizo. Honkongo estas kontata ankaŭ kiel "La Perlo de la Oriento" pro sia beleco kaj impona panoramo de sia pitoreska haveno. Ĝi estas la plej moderna metropolo de Ĉinio - antikva lando kun 6000 jaroj de kulturo. Dekojn da tradiciaj Ĉin-festoj oni celebras, samtempe kun la okcidentaj kiel Kristnasko kaj Pasko. Kolora kaj riĉa, la unika kulturo de Honkongo estas spertinda. Do, venu kaj spertu Honkongon -la "Urbo de Vivo"!

Temo

La Transiro al Tutmondiĝo

Tutglobismo en la 21a jarcento

Dum jarcento, Honkongo estis la renkontejo inter la Okcidento kaj la Oriento. Nun Honkongo estas ankoraŭ la loko kie popoloj de la tuta mondo venas por krei novan kaj pli bonan vivon. Kio estas la rezulto de tiu interfluo kaj interŝanĝo? Kiajn efikojn tutmondiĝo havos por la nova generacio en tiu ĉi kunfandejo?

"La komenco de la 21a jarcento ne nur estas nova epoko laŭ la kalendaro sed ankaŭ estos nova epoko rilate al la vivmaniero de la homaro. Ni povas retrorigardi al la pasinteco, sed ni ankaŭ devus rigardi antaŭen al la estonteco.

Al kiu kaj al kia komunumo ni apartenas? Kio estas la ĝusta rolo de la diversaj politikaj kaj sociaj organizaĵoj? Kio devus esti la rolo de Esperanto? Kaj, plej grave, kio estos mia propra rolo en la nuntempa transiro?"

Ronald J. Glossop, Emerita Profesoro de Filozofio,
Sud-Hinoja Universitato en Adwardsvilo, Usono

Aliĝiloj haveblas ĉe TEJO kaj LKK (Loka Kongresa Komitato), je la subaj adresoj, aŭ ĉe via loka E-asocio:

TEJO	LKK de IJK 2000
Nieuwe Binnenweg 176	p/a Ĉina Junulara E-Asocio
NL-3015 BJ Rotterdam	P.O. Kesto 77, Beijing
Nederlando	CN-100037
tejo-oficejo@esperanto.org	epc@china-report.com

Ĝeneralaj kaj freŝaj informoj: http://www.esperanto.org/ijk2000

Kotiztabelo①

(EUR)	**ĝis 1.2.2000**		**ĝis 30.4.2000**		**poste**	
Aĝo②	A	B	A	B	A	B
≤ 18	162	85	192	100	237	130
19-29	182	95	212	120	247	145
≥ 30	237	140	252	160	287	190

A-landoj: ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi sekve sub B-landoj
B-landoj: ĉiuj landoj de Afriko, Sud-Ameriko, iamaj socialismaj landoj
① Ĉinoj (ĉeflandaj/honkongaj/tajvanaj) bv. uzi aliĝilojn aparte haveblajn ĉe ĈJEA / HKJEA
② Aĝo je la 5a de aŭgusto 2000

Kontribuantoj al la Programo

Krom la variaj temaj programeroj, kursetoj pri Esperanto kaj ĉina kulturo, festenoj,... ne mankeblos programoj faritaj de vi -muzikistoj, artistoj, prelegantoj, lud-gvidantoj… IJK 2000 estas via kongreso kaj ni bonvenigas junajn aŭ jun-je-korajn talentulojn kiuj riĉigos nian programon tage kaj nokte. Bonvole petu detalojn kaj sendu vian proponon aŭ rekomendojn al Jeffrey Li, Programo - LKK de IJK 2000, p/a Honkonga Junulara Esperanto-Asocio, P.O.Box 92153, Tsim Sha Tsui Post Office, Kowloon, Honkongo. (aŭ jeff@esperanto.nu).
Akceptitaj kandidatoj ricevos rabaton je la kongreskotizo kaj / aŭ kompencon por la vojaĝkostoj.

Bv. skribi preslitere. Skribu latinlitere kaj ne esperantigu.

Aliĝilo

KN:_____
AP:_____
DB:_____
PG:_____

Familia nomo: . . . . . .
Persona nomo: . . . . . .
Sekso: ina / malina* Naskiĝdato: . . / . . / . . . . *(tt/mm/jjjj)*
Strato: . . . . . .
Poŝtkodo: . . . . . Urbo: . . . . . .
Lando: . . . . . .
Telefono: . . . . . (internacie)
Fakso: . . . . . (internacie)
Retpoŝto: . . . . . .
Nacieco: . . . . . Pasportnumero:. . . . . .
Dato de ekvalido: . . / . . / . . . . validfino: . . / . . / . . . . *(tt/mm/jjjj)*
Mi bezonas invitleteron al Honkongo: jes / ne*